




Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2005, numero 2-a: aprilo / majo
kun informoj pri renkontoj ekde la 15-a de aprilo



Geedzoj Ardachès kaj Madeleine Stakian-Vuille en aprilo 1937

Rememorigilo

SES informas

Redakcio:

Claude Gacond, Poŝtfako 3034,
CDELI, Biblioteko de la Urbo,
2303 La Chaux-de-Fonds.

Retpoŝto: claude.gacond@ne.ch

Tel.: ĉe CDELI: 032 967 68 55,
hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29:
indiki: por Claude Gacond

Redaktaj kunlaborantoj:
Rolf Ernst, Nancy Fontannaz, Andy
Künzli, Richard Schneller.

SES informas

Redaktaj datlimoj por la venonta jaro

2005-3: junio-aŭgusto : maje 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de junio.

2005-4: septembro-oktobro: aŭguste 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de septembro.

2005-5: novembro-decembro: oktobre 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de novembro.

2006-1: januaro-februaro : decembre 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de januaro.

SES-estraro

Bruno Graf, prezidanto, Jurastrasse 23,
3063 Ittigen/Bern. Tel.: 031 921 44 59.
Retpoŝto: bgraf.o@bluewin.ch

Dietrich Weidmann, vicprezidanto,
PF 301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25.
Retpoŝto: info@esperanto.ch

Mireille Grosjean, vic-prezidanto, Grand-
Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18
88. Retpoŝto: mireille.grosjean@rpn.ch

Nicole Margot, sekretario, Chemin des Lys
4, 1010 Lausanne. Tel.: 021 653 14 67.
Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch

Hans-Werner Grossmann, kasisto,
Esperanto-Servo, PF 262, 4132 Muttenz 1.
Tel.: 076 460 8992. Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo 2300 La Chaux-de-Fonds

Kotizoj al SES

kun ricevado de *SES informas*.

fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
fr. 50	Paroj	"
fr. 70	Patronoj	"
fr. 25	nura abono al	<i>SES informas</i>



Svisa kalendaro

Aprile

- 16: Zürich: Ĝenerala Jara Kunveno de SES.
23-24: Chaux-de-Fds: KCE: Lingva ekonomiko.
27-maje 1: Genève: Stelo: Libro-Foiro.
28: Basel: ESB: Surpriza kunveno.

Maje

- 2 : Lausanne: ESL: Kunveno kun Vahid pri Irano
3: Genève: Stelo: Filmo Lekanto en Pekino.
4: Luzern: LES: Konversacia rondo.
15: Redakta datlimo de SES informas.
21: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
25: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
26: Basel: ESB: Invito ĉe Berthe Spalinger.
28-29: Chaux-de-Fds: KCE: 25 jaroj de LF-koop.

Junie

- 1: Luzern: LES: La Brünig-fervojo.
7: Genève: Stelo: S. Keller parolos pri Peruo.
8: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
18: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
22: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
23: Basel: ESB: Minigolfa kunveno.
24-29: Chaux-de-Fonds: KCE: PEN-klubo.

Julie

- 6: Luzern: LES: Konversacia rondo.
9 : Luzern: LES: Ekskurso al Seebodenalp.
11-15: Grindelwald: KCE, Naturamika Semajno.
20-23: Vilno: Kongreso de IKEK.
23-30: Vilno: 90-a Universala Kongreso.
26-31: Chaux-de-Fonds: KCE: progresiga kaj perfektiga kursoj de esperanto.

Aŭguste

- 3-7 & 9-13: Chaux-de-Fds: KCE: Esperantologia fakultato kun Duncan Charters, Giorgio Silber kaj Usui Hiroyuki.

- 15: Redakta datlimo de SES informas.
21: Tegerfelden: ESB: Vizito de la Vinmuzeo.

Septembre

- 3: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
5: Lausanne: LES: Kunveno.
7: Luzern: LES: Konversacia rondo.
9: Basel: ESB: Invito ĉe Nicole Bérout-Focke.
14: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
28: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.

Oktobre

- 1: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
3: Lausanne: LES: Kunveno.
5: Luzern: LES: Universala Kongreso.
12: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
15: Redakta datlimo de SES informas.
22: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
26: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
27: Basel: ESB: Ĉiu rakontas pri siaj ferioj.

Novembre

- 2: Luzern: LES: Konversacia rondo.
5: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
7: Lausanne: LES: Kunveno.
9: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
15: Redakta datlimo de SES informas.
19: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
23: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
24: Basel: ESB: Programo 2006.

Decembre

- 3: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
7: Luzern: LES: Zamenhof kaj programo 2006.
10: Basel: ESB: Zamenhofa festo, ESB 100-jara.
14: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela zamenhofa festo.
15: Redakta datlimo de SES informas.

Vivo de SES

SES-Tago en Zuriko

Rememorige

(Por detala informado konsultu la bultenon 2005-1)

Sabaton, la 16-an de aprilo 2005 en la Esperantejo – Akazienstrasse 6 – Zuriko-Seefeld

Trajne al Zuriko-Stadelhofen aŭ per tramo 2 kaj 4 ĝis haltejo Stadelhofen.
(Mapo troveblas sub www.esperanto.ch/mapo.html)

Programo

09.30 – 10.30: Bonveniga aperitivo, kafejo kaj librovendejo malfermitaj

10.30 – 13.00: **Ĝenerala kunsido de SES:** Tagordo: 1. Komunikoj de la prezidanto. 2. Elekto de la voĉnombrantoj. 3. Protolo de la lastjara kunveno. 4. Jarraporto 2004, jarkalkulo, bilanco, raporto de la revizoroj. 5. Agado kaj buĝeto 2005, 6. Honorigo de membroj. 7. Diversaĵoj.

13.00 – 14.00: **Tagmanĝo**

14.30 – 15.30: **Prelego pri ĉina ŝakludo.** Preleganto: Beno Frauchiger de Bazelo

15.30 – 16.30: Librejo kaj kafejo malfermita (vendado de libroj, kafo, kukoj ktp.)

16.30 – 17.45: **Prelego pri Feng Ŝui kun multmediprezentaĵo far Rolf Ernst.**

18.00 – 20.00: **Komuna vespermanĝo**

20.00 – 21.30: **Arta kaj distra programo,** la vespero staras sub la moto “100 jaroj Esperanto en Zuriko”, ĉar en aprilo 1905 ekestis la plano fondi Esperanto-Societon Zuriko, kio realiĝis la 20-an de decembro 1905.

21.0: Lasta ebleco akiri librojn, adiaŭado

Raporto de la kaskontrolantoj

Ni, subskribintoj, Dieter Rooke kaj Christiane Sixtus, kunvenis kun la kasisto Hans Grossmann, la 15an de januaro 2005 en Bern por kontroli la librotenanadon.

La saldoj de la jaro 2003 estas ĝuste transskribitaj, la kontrolitaj ciferoj kongruas kun la pruviloj, same la saldoj fine de 2004.

Post diskuto kaj kelkaj detalaj korektoj kiujn efektivigis nia kasisto, ĉio enordas. Ni do proponas al la Ĝenerala Jarkunveno aprobi la kontojn (kun profito de CHF 4'701.30), la bilancon 2004 kaj malŝarĝi la kasiston kaj la estraron.


Ni kore dankas nian kasiston Hans Grossmann por la tre bone farita librotenanado, lia diligenteco kaj afableco.

La 8an de februaro 2005

Kaskontrolantoj :

Christiane Sixtus

Dieter Rooke



Arthur Baur 90jara

Nia honora membro d-ro Arthur Baur fariĝis 90-jara la 19-an de februaro. Nome de SES ni gratulas lin. Lia nuna adreso estas Wohngruppe Sunnmatt, alte Landstrasse 139, 8708 Männedorf.

Okaze de lia transloĝiĝo en novan hejmon lia filino Irène Thomann renkontiĝis kun Dietrich Weid-

mann, prezidanto de Esperanto-Societo Zürich kaj kun Claude Gacond cele al transdono de la esperanta libraro kaj dokumentaro de sia patro por arkivado ĉe CDELI. Pere de la prezidanto de ESZ okazos kontakto kun la zurika Centra Biblioteko cele al la riĉiĝo de ties esperanto-fako.

Konkurso pri esperanta grafikbazo

Ĉio ekiĝis per ideo de François Randin: la esperanta komunumo ne havas aktualan grafikbazon. Tio rilatas al la bazo necesa por konstrui ĉu afiŝon, ĉu flugfolion, ĉu ia-ajn-aĵon, kiu rilatas al esperanto. SES ja havas tian bazon, sed multaj lokaj grupoj eĉ ne havas insignon, kaj eble ne bezonas iun. Tamen kiam oni volas varbi aŭ informi pri esperanto, sen fari tion nome de iu insigno-hava asocio, nur ekzistas unu afero: la verda stelo! Sed tiu stelo jam havas longan historion, kaj antaŭe estis erare asociita kun multaj aliaj aferoj, tiel ke ĝi ne plu tiom allogas. Tial, ni decidis lanĉi konkurson en la loka grafik-lernejo ERACOM.

Post aranĝo kun la direktoro de tiu lernejo ni vizitis klason por prezenti kaj prelegeton pri esperanto kaj la regulojn de l' konkurso. Ni kunportis multajn paperaĵojn pri esperanto, por montri la ekzistantajn grafikajn bazojn kaj insignojn. Post tiu prezentado deko da lernantoj kaj la instruistino aliĝis al esperanto-kurso, kiun François Randin starigis en la lernejo. Tiel plejparte la studentaro rapide akiris sufiĉe bonajn konojn pri la lingvo kaj movado, ebligante bonan komprenon de la konkursa celo.

Ĉar tiu konkurso postulis premion monan, ni kontaktis SES-n por peti subvencion, kaj la peto estis akceptita. Siaflanke Laŭzana Esperanto-Societo ankaŭ finance partoprenos. Tiel ni formis juĝ-grupon kun tiuj anoj: la

instruistino de la klaso (por la lernejo) Bruno Graf (por SES), Nicole Margot (por SES kaj LES), François Randin (por LES) kaj Laurent Burgbacher (por LES kaj JES).

Post du monatoj tiu ĉi grupo kuniĝis en ERACOM por vidi la faritan laboron. Je tiu punkto ĝi precipe konsistas el insignoj. Komenciĝis du-hora cerbumado konsistanta el rigardado, legado, diskutado kun la instruistino (bedaŭrinde la lernantoj ne ĉeestis). Post inspektado de dekduo da laboroj ni komencis elimini la plej "malbonajn" (en la senco ekstertema, nekomprenebla aŭ nealloga), ĝis kiam restis nur ses kreaĵoj. Tiam ĉiu donis poentojn al siaj tri preferaĵoj, cele al gardo de la tri plej bonaj. Ĉar tio rezultis en egaleco de du laboroj por la tria grado, ni decidis premii tiujn kvar. Lasta voĉdono rezultis en gradigo de la kvar premiaĵoj.

Ni tre kontentis, ĉar la instruistino tute akordiĝis kun la gradigo, kaj tio signifas, ke nia elekto estas bona ankaŭ laŭ la akademia vidpunkto.

Kaj nun? Pluraj aferoj ankoraŭ okazos. Unue la premiuloj estos invititaj al manĝo en restoracio, kaj tiam ricevos la premiojn. Due la laboroj estos ekspoziciitaj en la lernejo. Ni baldaŭ informos vin pri la dato de tiu publika ekspozicio. Fine la uzondiĉoj de tiu insigno estos klarigitaj kaj publikigitaj en venonta bulteno.

Laurent Burgbacher

Donacoj

Pagis duoblan kotizon, kaj do estas patronoj 2005:

John Hasler, Ostermündingen; Marguerite Jayet, Morges; Alois Koller, Zürich; Christiane Sixtus Pot, Perly / Genève.

Donacoj en svisaj frankoj:

Anonimulo: 25; Charlotte Blanc-Maillard, Vevey: 15; Armand Cotton, Vandoeuvres: 25; Jeannine Jeanneret, Neuchâtel: 15; Jeanne Mamin, La Tour-de-Peilz: 30; Jimmy Rivière, Prilly: 15; Paul Scherer, Emmen-

brücke: 5; Marguerite Viredaz, Lausanne: 10; Suzanne Wanner, Plan-les-Ouates: 25; Henri Wettstein, Versoix: 15. Sume: 180.

Agado 2005 (ne plu 2003)

Françoise Badoux, Lausanne: 10; Nancy Fontannaz, Pully: 25. Sume 35.

Nome de SES la kaskisto Hans-Werner Grossmann dankas la registritajn donacintojn pro ties malavareco kaj antaŭdankas pro la atento, kiun ĉiu alportos al la pagilo aldonita al la nuna bulteno.

Dankon al Mad Mevo

Okaze de siaj oftaj venoj en La Chaux-de-Fonds, vizite al CDELI aŭ KCE, Madeleine Stakian ŝatis rememorigi, ke en tiu ĉi urbo ŝi ne nur naskiĝis, sed ankaŭ akiris sian kulturen orientiĝon al promenemo en la naturo, al anarkiisma politika sinteno, al kontaktemo kun la surstrataj renkontatoj.

Plurfoje, kiam grupe ni forlasis la straton Postiers, kie situas KCE, por iri al CDELI, ŝi petis, ke anstataŭ rapide marŝi laŭ la stratoj Succès kaj Progrès, ni akceptu devojiĝi al ŝia ŝatata avenuo Numa-Droz. Kaj tiam ŝi rakontadis pri sia infaneco.

Imagu, ke vintre ni tie ĉi glitsuadis sur la glaciita premita neĝo, kaj ke alisezone ni surstrate ludadis. Imagu, ke kun aliaj knabinoj mi dancadis sur tiu ĉi strato ! ŝi entuziasmis.

Ŝi esprimis sian bedaŭron pri la malapero de la strat-butikoj, kien ŝi ofte kuris por aĉeti mankantajn nutraĵojn kaj kie ŝiaj gepatroj kudrigis novajn vestaĵojn. Tiam

ŝi kritikemis kontraŭ la malpozitiva urba evoluo : ke la infanoj perdis sian ludejon pro la kreskinta trafiko, ke fermiĝis la kvartalaj magazenoj profite al foirejaj grand-surfacoj ĝenerale eksterurbaj. Kaj ŝi ŝatis konkludi, ke nur la ĝenerala strat-aspekto restis : kvazaŭ bela avenuo de granda urbo.

Kaj ŝi ankaŭ ĉiam rakontis al la kunpromenantoj, ke tie ŝi komencis pianludi por akompani patron kaj familianojn muzikemajn. Kaj pri sia familio Vuille ŝi ne forgesis aldoni, ke ĝi ne estas ĉaŭdefona, sed devene de la najbara vilaĝo La Sagne.

Dum tiuj promenoj ŝi ankaŭ klarigis sian plumnomon Mad Mevo. « Mad » ĉiuj komprenis, kiel mallongigon de « Madeleine », kaj « Mevo », ŝi aldonis, ne nur estas la komencliteroj de « Madeleine Vuille », sed la konsekvenco de mia transloĝiĝo al Ĝenevo, ĉe kies lago mi ŝategas promenadi admirante la flugantajn mevojn. Tial la literoj « MV »

ne prononciĝas « movo » laŭ la norma esperanta literumado, sed « mevo » admire al la birdoj revigaj kaj ankaŭ dankeme al la poemo *Flugas mevoj de Georgo Deŝkin, poeto inspirinta mian poeziemon*. Kaj konklude ŝi plurfoje surstrate recitis la revigan poemon :

*Flugas mevoj super maro,
Blankaj, blankaj mevoj.*


*Post ilia ĝoja aro
Flugas miaj revoj.*

Blankaj mevoj flugas alte,

*Alte super ondo,
Kaj senlace, kaj senhalte
Al mirinda mondo
Flugas miaj revoj,
Kiel blankaj mevoj...*

Ŝi plurfoje konkludis, ke la vorto « movo » estus ankaŭ bone personiginta ŝin, ĉar persono ege mov-ema, vojaĝema, grand-parte pro esperanto, ŝi ĉiam restis.

Claude Gacond



Madeleine kaj Ardachès Stakian-Vuille okaze de ilia ora geedziĝo en 1986

Brasikfolio digne honoris sian redaktinton

La Stelanoj ne nur grandnombre ĉeestis la religian funebran ceremonion

adiaŭan al Madeleine Stakian la jaŭdon 9-an de decembro. Poste, per speciala januara numero de *Brasikfolio*, ili publikigis serion da mesaĝoj, el kiuj ni ĉerpas kelkajn citaĵojn. Interesatoj sciu, ke tiu bulteno akireblas ĉe CDELI kaj ĉe La Stelo.

Honora Prezidantino

Per eksploda aplaŭdo la ĉeestantoj akceptis la proponon pri titolo de **Honora Prezidantino** por s-ino Madeleine Stakian, kiu multajn jarojn sindonis laborante ne nur por La Stelo, sed por la Movado ĝenerale, ĉu per kontribuo al la esperanto-literaturo, ĉu per instruo de nia lingvo.

(Ĝenerala Jarkunveno de la Stelo, marto 1971)

Dialogo

Estas emociige por mi publike omaĝi al Madeleine Stakian laŭ tiu grava aspekto de ŝia vivo, kiu estis esperanto. Kiam, por studi en la Interpretista Lernejo, mi alvenis, tute juna, en Ĝenevon, kie mi konis neniun, Madeleine Stakian kaj ŝia edzo akceptis min kiel filon. Fakte, mi ofte sentis min membro de ilia familio.

[...]

Via kontribuo alportis spiritan pliriĝigon al tiuj, kiuj, en plej diversaj landoj, havis la grandan bonŝancon malkovri tiun lingvon, kiun vi tiom amis, ĉar, relokante modojn kaj mesaĝojn de la socio al ilia loko efemera, vi tuj sentis, kiom ĝi povas alporti al interpopola dialogo, al dialogo kor-al-kora mokanta la lingvobarilojn. Tiu sento rekte ligiĝis al via religia kredo.

En esperanto, *dialogo*, unuvorte skribita, signifas « interparolado », sed ĝi sonas kiel la duvorta *dia logo* « la fakto, ke Dio allogas ». Tiun koincidon de la du konceptoj bele ilustris la tuta vivo de Madeleine Stakian.

Claude Piron

Geedza harmonio

Mia unua rememoro pri Madeleine Stakian aĝas el mia infaneco, kiam mi vizitadis la protestantan diservon. Tiam ŝi fidele prizorgis la orgenludadon en la paroĥo de Bernex-Confignon. Mia unua kontakto kun ŝi estis do muizika.

Kiam kelkajn jarojn pli aĝa mi eklernis esperanton, mi partoprenis kunvenon en Ĝenevo por novlernantoj. Kaj tie, je ambaŭ nia surprizo, mi trafis Madeleine Stakian. Tiel komenciĝis mia dua rilato kun ŝi, multe pli daŭra, la esperanta.

Baldaŭ mi vizitadis la progresigan esperanto-kurson, kiun ŝi gvidis en sia hejmo. Tiam kaj dum la multnombraj komitatkunsidoj de La Stelo, kiujn ŝia hejmo gastigis, mi iom post iom konatiĝis kun plia grava aspekto de ŝia vivo : la gedza harmonio.

Tiel, dum jardekoj, ĉiam modeste sed okulfrape, Madeleine kaj Ardachès Stakian aperis kiel modelo de duobla fideleco : fideleco al esperanto kaj fideleco geedza. Nehazarde ambaŭ aperis ligitaj : ja ili ekkonis sin sekvante la saman esperanto-kurson.

Mi estas certa, ke la bildo de tiu harmonia paro senkonscie influis profunde mian propran vivon geedzan.

Andres Bickel

En eŭropa Feriosemajno

La EFS-arangoj celis unuavice ebligi al eksterlandaj gesamideanoj pasigi kelkajn feriotagojn en Svislando kaj konatiĝi kun ĝiaj belecoj. Gesinjoroj Stakian, kiuj estis, krom la gvidantoj, la solaj personoj loĝantaj en Svislando, evidente ĝuis la restadon inter tiom da eksterlandaj gastoj. Kaj, kiam, iun vesperon Hans Hunkeler donis al ĉeestantoj la eblecon ion kontribui al la distra programo, sinjorino Stakian senhezite pretis deklami poemon en esperanto. Ŝi faris tion tiel bone, ke ŝi rikoltis grandan aplaŭdon.

Ŝia kapableco forte impresis min, kaj mi ĉiam ĝojis, kiam mi revidis ŝin.

Ernst Glättli

Oni uzu la lingvon korekte !

Poemoj, skeĉoj, kantoj... ĉio fluis leĝer-anime. Sed ŝiaj oreloj gratis je aŭdo de

lingva eraro, kion ŝi tuje korektis : - *Oni nepre uzu la lingvon korekte !* – tiurilate ŝi estis severa. Je ŝia longdaŭra prezidanteco la kunvenoj de La Stelo komenciĝis per lingva ekzercado. Mi – ni multon lernis de ŝi.

Anita Altherr

Kortuŝa afableco

Antaŭ multaj jaroj mi lernis aŭtodidakte la esperantan lingvon, nur por ekscii iomete pri ĝi. Sed baldaŭ mi aliĝis al la grupo La Stelo. Mi tuj sentis min kiel en granda familio, dank' al la ege afabla akcepto de Madeleine Stakian. Kun multe da pacienco ŝi instigis min paroli esperanton. Dum la komitat-kunvenoj ni renkontiĝis en ŝia hejmo : kiom da ĉarmaj vesperoj ! Ŝi ĉiam servis teon kaj kukon, kiun ŝi bakis. La konversacio estis interesa dank' al la saĝeco de Ardachès, ŝia edzo. Tre dankeme mi ĉiam pensas pri tiu multjara amikeco kaj la kortuŝa afableco de Madeleine.

Eva Vischer

Iom pri ŝia vivo

Madeleine Stakian-Vuille, kiu naskiĝis la 15-an de februaro 1910 en La Chaux-de-Fonds, vizitis la superan kaj komercan lernejojn en Ĝenevo, kie en 1927 ŝi diplomiĝis. Poste ŝi laboris en gazeta entrepreno kaj en banko. Apudprofesie ŝi instruiĝis pri piano kaj orgeno, bekfluto kaj solfeĝo kaj kantis en ĥoroj, kaj muzikinstruadis ne nur siajn filinojn, sed ankaŭ aliajn lernantojn. Ŝi lernis esperanton en 1928/29. Ĝis 1937 ŝi laboris ĉe UEA en Ĝenevo kiel sekretarino kaj kontistino. Posedante la Superan Diplomon, en la 70-aj jaroj ŝi funkciis kiel anino de la Ekzamena Komitato de SES, kiu en 1978 elektis ŝin honora membro. Ĝis 1994 ŝi prezidis la ĝenevan grupon La Stelo kaj multajn jarojn redaktis ĝian organon *Brasikfolio*.

Ŝi fariĝis konata kiel esperanto-poetino sub la pseŭdonomo Mad Mevo, verkante originale kaj traduke el la franca kaj germana lingvoj, ekz. tradukoj de *Winterreise* de Schubert, de la *Cignokanto*, de francaj poemoj, aperintaj en la *Svisa Antologio* (1939) kaj esperantigis romandajn popolkantojn. Ŝia armena edzo (1936) Ardachès Stakian (1909-1998) elmigis en 1922 el Turkio al Svislando, kie li akiris la svisan civitanecan kaj laboris kiel diplomita herb-drogisto kaj farmaciisto. Ambaŭ partoprenis multajn esperanto-aranĝojn en- kaj eksterlande. Madeleine Stakian mortis la 3-an de decembro 2004 en la maljunulejo Vendée en Petit-Lancy, Ĝenevo.

Laŭ Andy Künzli, Planlingva Enciklopedio

Libero

(originala poemo)

Migradi – sur vojoj senlimaj,
Marŝadi senlace tra l' valo,
Luliĝi je revoj intimaj
En kara forges' de l' realo...
Ho ĝuo profunde feliĉa,
Ho plena liber' de la kor',
Ho ĝojo eĉ esti malriĉa,
Kun vivo-donac' – amtrezor' !
Hej for, vi maljusto, sufero,
For, ĉiu mizer' de l' popolo...
Mi iras sur voj' de libero
En kiu parfumas violo.
Kaj vibras per ĉiuj fibroj
La koro, pro vera plezur'
Legadi plej belan el libroj :
La sankta parol' de l' Natur'.
Al ĉarma la kanto hirunda
Ravite respondas l' anim'.
Pro ĝuo de l' belo abunda
Ĝi rompas katenon sen tim'
Kaj flugas kun ĝoj al aero
Sur flirta hirundo-flugil'...
Ho kantu, kantadu, Libero
Triumfe glori-kantojn en mil' !

Mad Mevo, Internaciaj Floraj Ludoj, 1935.

Tutsvisa aktiveco

CDELI

Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia

Biblioteko de la Urbo

Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds
Tel. : 032 967 68 55.

Fakso : 032 967 68 29, indiki : por CDELI.

Retadreso: cdeli.vch@ne.ch

martine.schneller@ne.ch

claude.gacond@ne.ch

nancy.fontannaz@ne.ch

monika.molnar@ne.ch

Studsabatoj

Dudeko da studemuloj el tuta Romandio partoprenis la martan stud-sabaton. Instruis al tutkomencanto Nancy Fontannaz, al komencantoj Claude Gacond kaj al progresantoj Monika Molnar.

Dataro de la venontaj prilingvaj studsabatoj (okazantaj je la tria sabato de la monato): maje 21, junio 18, oktobre 22, novembre 19.

Dataro de la venontaj kulturaj seminarioj (okazantaj je la unua sabato de la monato): 2005 septembre 3, oktobre 1, novembre 5, decembre 3. Anonciĝos la programo en la venonta bulteno.

Horaro

9 h 30: Malfermo de la CDELI-salono kun eblo aĉeti librojn kaj babili kafumante.

10 h 30: **Oficiala malfermo**, formiĝo de la stud-rondoj.

11 h 00: **1-a studperiodo.**

11 h 45: paŭzo.

12 h 00: **2-a studperiodo.**

12 h 45: Paŭzo por komuna tagmanĝo en najbara restoracio.

14 h 30: **3-a stud-periodo.**

15 h 15: teuma paŭzo.

15 h 30: **4-a stud-periodo.**

16 h 15: **Konkluda kunveno.**

16 h 30: Teumo, librovendo.

17 h 00: **Oficiala fermo.**

17 h 30: Fermo de la CDELI-salono.

Aliĝo: Por faciligi la organizon de la studaj kaj seminarioj sabatoj ĉiu bonvolu nepre antaŭanonci sian partoprenon al Claude Gacond :

ĉu skribe : Claude Gacond, CDELI, Biblioteko de la Urbo, CP 3024, 2303 La Chaux-de-Fonds,

ĉu rete: claude.gacond@ne.ch

ĉu telefone: CDELI: 032 967 68 55, (hejme 032 926 52 32).

Partoprenkotizo: Por minimuma kovro de la elspezoj la partoprenkotizo estas po Fr. 15.- por partopreno (lernejo, studento, metilernanto senpage). Kiu ne antaŭanoncis sian partoprenon, tiu pagas pluse Fr 5.-.

Instalado de la nova CDELI-salono

Veran metamorfozon travivas CDELI en la transformata biblioteko. Ĉiuj vizitantoj admiras la novan labor-salonon, kies grandaj fenestroj okulumas ne nur al la urbo-centro, sed ankaŭ al la fora montaro. Tiu prestiĝa lokiĝo centre de la biblioteko efikas pozitive favore al la aktiveco mem de CDELI.

Sed la translokiĝoj ne finiĝis. Dum la marta monato devis pakiĝi parto de

la arĥivaĵo kuŝanta en la movŝranka koridoro cele al konstruo de pordo. Sed baldaŭ CDELI disponos pri 5 pliaj movŝrankoj por ordigi sian materialon nun provizore deponitan en la supera etaĝo de ŝtuparo baldaŭ malaperonta favore al la instalado de lifto, kiu haltos vidalvide la CDELI-salono.

Tiuj ĉi transformoj haltigos la aktivecon de CDELI dum la somera sezono kaj jam nun malebligas normalan aliron al parto de la arĥivo.

Unu el la konsekvencoj de tiuj transformoj estis malakuratiĝo en la aper-ritmo de nia bulteno *SES informas*. Espereble per tiu ĉi numero 2005-2 ni revenis al dezirinda akurateco.

Claude Gacond

KCE

Kultura Centro Esperantista
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311
2301 La Chaux-de-Fonds
Tel. & Fakso : 032 926 74 07
kce.esperanto@bluewin.ch

Programo

Aprile 23-24: Enkonduko al lingva ekonomiko. Prelegos d-ro Michele Gazzola.

Maje 28-29: Festo okaze de la 15 jaroj de LF-koop.

Junie 24-29: Esti virino kaj verkisto en la nuna mondo – internacia du-lingva kolokvo franca-esperanta de PEN-klubo, kunlabore kun feminisma esperanta movado de KCE.

Julie 11-15: Naturamika Semajno en Grindelwald. Surloka gvidanto: Francisko Degoul.

26-31: Progresiga kaj perfektiga kursoj de esperanto.

Aŭguste 3-7 kaj 9-13: esperantologia fakultato, kun prof. Duncan Charters (didaktiko), Giorgio Silfer (literaturo / historio) kaj Usui Hiroyuki (interkulturaj demandoj).

Informinto: Dieter Rooke.


Raporto

La kultura januara semajnfino de la estis dediĉita al vegetarismo kaj dadaismo. Venis el la sveda Gotenburgo Jarlo Martelmonto por plezurigi la partoprenantojn per verd-aĵoj, per monro de lumbildoj kaj per deklamo el sia poemaro *Cetercetera*.

Antaŭ 50 jaroj la manuskripto *La infana raso* estis ricdvita de Juan Régulo Pérez en Kanariaj Insuloj. La eldonisto bezonis tutan jaron por produkti la verkon de William Auld, kiu restos la ĉefverko de nia originala poezio postmilita.

KCE inaŭguris la jubilean jaron de *La infana raso* per prelegaro de Giorgio Silfer la 26-27-ajn de februaro. La ĉeestantoj en familia etoso sekvis la naskiĝon de la verko, aŭskultis la deklamadon de Bill Auld mem, kiu belege redonas la muzikecon de nia lingvo esperanto. Ni mem kontribuis aktive al la programo, laŭtleĝante elektitajn kantojn kun la gvido de nia preleganto.

-oOo-



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel, Tel.: 0049 76 214 57 12

Kunvenoj : 20 h 00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

Kunvenoj

Aprile 15-17: Regiona staĝo en Lucelle organizita de Mulhouse-Esperanto.

Aprile 28: Surprizo.

Maje 26: Ĉe Berthe Spalinger.

Junie 23: Minigolfo en Grün 80.

Aŭguste 21: Vizito de la vin-muzeo en Tegerfelden.

Septembre 22: Invito ĉe Nicole Béroud-Focke.

Oktobre 27: Ĉiu rakontu pri siaj ferioj.

Novembre 24: Programo 2005.

Decembre 10: Zamenhofa festo kaj cent-jariĝo de ESB. Ni invitas jam nun aliajn grupojn festi kun ni.

Raporto

La jarraporto prezentita al la ĝenerala kunveno okazinta la 27-an de januaro estis okazo ririgardi al la aktivecoj de la pasinta jaro 2004-a, kiu komenciĝis

januare per la ĝenerala jarkunveno. En februaro estis laŭt-legitaj partoj de la libro *Esperanto sen mitoj* de Ziko Sikosek, kiu bedaŭrinde ne povis veni prelegi en marto pro familia kaŭzo. En aprilo okazis la ŝatata skrabla vespero Alia agrabla tradicio estas vespermanĝo sur la teraso ĉe Berthe Spalinger en Reinach kaj ankaŭ la vespero en la Grün 80. Post la ferioj okazis kun belega vetero migrado de Lange Erle al Bettingen kun konkludo en la ĝardeno de Hans-Peter Senn. Septembre ĉiuj raportis pri siaj ferioj kaj oktobre en agrabla rondo la grupo frandis fonduon ĉe Hans-Peter Senn. En novembro okazis kunveno kun gimnazianino pretiganta maturlaboron pri esperanto. Kaj en decembro la zamenhofa festo ebligis renkontiĝi kun geamikoj el Francio kaj Germanio en Battenheim. Post agrabla kafumado André Grossmann raportis pri la UK en Pekino kaj pri sekva postkongreso en aliaj urbo de Ĉinio.

La bulteno *Sud-Rejna Kuriero* eldonita kun la najbara grupo Mulhouse-Esperanto pli kaj pli belaspektas.

Laŭ *Sud-Rejna Kuriero* 2005-17.

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

Espéranto-infos : Tel. : 022 740 04 45

Monata kunveno ĉiun unuan mardon de la monato (krom julie kaj aŭguste) en la stacidomo de Cornavin, kajo 1, Salle des conférences 2, je la 20 h 00.

Kunvenoj

Aprile 27 ĝis la 1-a de majo : Budo de La Stelo en La Libro-Foiro.

Maje 3 : François Randin prezentos sian filmon « Lekanto en Pekino ».

Junie 7 : Stefano Keller parolos pri Peruo.

En septembro estas antaŭvidata komuna vespermanĝo por festi la cent-jariĝon de la societo.

Oktobre prelegos Claude Piron en Uni Mail pri la temo « *L'anglais et/ou l'espéranto* ».

Raporto

La kunveno de la 4-a de januaro ĝoje inaŭguris novan kunvenejon en *Salle des conférences 2* ĉe *Gare Cornavin*, Kajo 1, per trinko de ĉampanjo. Tiam Arlette Di Vetta konstatis, ke en Ĝenevo la movado bone kaj diversmaniere vivas: la babil-rondo lunde, la konversacia grupo jaŭde, la kursoj je 2 niveloj en la Popola Universitato regule disvolviĝas apud la regula kunveno de La Stelo la unuan mardon de la monato.

La 1-an de marto okazis la ĝenerala jarkunveno de La Stelo kun 11 ĉeestantoj. La kasistino Gilda Pace estis dankita pro la bona prezentado kaj

tenado de la kontoj, kiujn kontrolis Patrick Perréard. Per sekreta voĉdono estis nomumita 5-membra komitato konsistanta el Armand Cotton, Arlette Di Vetta, Gilda Pace, Christiane Sixtus kaj Eva Vischer. La jarkotizo por la venonta jaro 2006 estos por aktiva membro fr 40.-, por paro fr 50, por lernanto aŭ emerito fr 30 kaj por subtenanto fr 25.

La Agadraporto 2004 estas citinda :

La stelanoj kunvenis 12 fojojn dum la jaro 2004, se oni povas uzi la vorton « kunveno », kiam nur unu persono ĝin ĉeestas ! kiel okazis en julio sur la insulo Rousseau ! Resume ĉeestis la 6-an de januaro 11 personoj, la 3-an de februaro 9 personoj, la 2-an de marto 14 personoj, la 6-an de aprilo 10 personoj, la 4-an de majo 10 personoj, la 1-an de junio 11 personoj, la 17-an de junio : 1 persono, la 14-an de aŭgusto 2 personoj, la 7-an de septembro 11 personoj, la 5-an de oktobro 10 personoj, la 2-an de novembro 6 personoj, kaj la 7-an de decembro 12 personoj.

La bulteno *Brasikfolio* aperis 8-foje kaj indas menci, ke ĝin senpage produktas la presejo Imprimerie Pot en Grand-Lancy.

De la 28-a de aprilo ĝis la 2-a de majo La Stelo havis budon en la Libro-Foiro de Ĝenevo. Ne antaŭdecidite la Stelo ankaŭ havis budon en la kvartal-domo de La Servette la 15-an de majo kaj en la lernejo Budé la 11-an de junio. La 27-28-ajn de septembro okazis jubileo-festo 20-jara de Radio Cité kaj ankaŭ tie staris verda budo. En Uni Mail ariĝis ses-

deko da personoj por aŭskulti la prelegon de Claude Piron. Tiu evento alportis multajn lernantojn al la Popola Universitato por nova esperanto-kurso kaj ebligis aperigi plurajn anoncojn en la gazetaro.

La 3-an de decembro forpasis Madeleine Stakian kaj pluraj stelanoj ĉeestis la funebran ceremonion la 9-an de decembro

Laŭ *Brasikfolio* 2005-2, 3 kaj 4.

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale 389, 1009 PULLY

Tel: 021 729 58 02

<esperanto@isuisse.com>

<<http://www.esperanto.ch>>

Kunvenoj : Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20 h 00.

Kunvenoj

Maje 2: Vahid, juna irana esperantisto parolos pri sia lando.

Junie: ekskurso decidota..

Septembre 5: Temo anoncota.

OktoBRE 3: Temo anoncota

Novembre 7: Temo anoncota.

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo

Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke

Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj:

Hotelo Steghof, Voltastrasse 2, atingebla de la stacidomo per la trolebusoj 4 kaj 5.

Hotelo Waldstätterhof, Zentralstrasse 4 (proksime de la stacidomo). Tel. 041 2 271 271.

Gesinjoj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. Tel.: 041 210 25 88.

Kunvenoj

Maje 4: Waldstätterhof: 14h00-16h00: Konversacia rondo kun Franz Brügger.

Junie 1: Ĉe ges-roj Rey: 14h00: Paroliga leciono kun Franz Brügger, 14h30: La Brünig-fervojo kun Koni Rey.

Julie 6: Waldstätterhof: 14h00-16h00: Konversacia rondo kun Franz Brügger.

9: Ekskurso duontaga al Seebodenalp-Altruedisegg sub la gvido de Margrit Scherer.

Septembre 7: Waldstätterhof: 14h00-16h00: Konversacia rondo kun Franz Brügger.

OktoBRE 5: Ĉe ges-roj Rey: 14h00: Paroliga leciono kun Franz Brügger, 14h30: Universala Kongreso en Vilno, Litovio, kun Dieter Rooke.

Novembre 2: Waldstätterhof: 14h00-16h00: Konversacia rondo kun Franz Brügger.

Decembre 7: Ĉe ges-roj Rey: 14h00: Paroliga leciono kun Franz Brügger, 14h30: Zamenhofologio kaj programo 2006 kun Paul Scherer.

2006 januare 4: Waldstätterhof: 14h00-16h00: Konversacia rondo kun Franz Brügger.

Raporto

Enkonduke al la "jarraporto 2004 de la prezidanto" Paul Scherer sin tiel esprimas *"Antaŭ precize 50 jaroj mi kun entuziasmo komencis lerni esperanton kaj ĝis hodiaŭ nur 5 aŭ 6 personojn gajnis por nia afero."*

Tiu pesimisma konstato atestas, kiom malfacile aŭdiĝas la esperanta

mesaĝo en la nuna alemana Svislando kredanta je la angla mondlingva solvo.

La grupaj kunvenoj okazis 4-foje en Steghof kun meze 7,25 partoprenantoj. Prelegis Annelies Dettling, Andy Künzli, Dieter Rooke kaj Paul Scherer. 6-foje en Simplon kaj plue ankaŭ en Steghof Franz Brügger gvidis la konversaciajn rondojn. Bone sukcesis la ekskurso, kiun gvidis Rosa Mettler kaj Louise Bachmann, kiel raportite en *SES informas* 20004-4.

La estraro kunsidis tri fojojn kaj LES-anoj ĉeestis la aranĝojn de SES en Vevey, Les Brenets kaj Bern, kaj la lastajn GERI-renkontojn en Rotkreuz. Ankaŭ eksterlande LES-anoj ĉeestis esperantajn manifestaciojn, kiel ekzemple en Strasburgo por la "Eŭropa Bunto".

Paul Scherer helpis al Andy Künzli, kiu finverkas la planlingvan enciklopedion por kompletigi la tekstojn pri IKUE kaj KELI.

Kantono de Neuchâtel Esperanto-kurso ĉe Université populaire en La Chaux-de-Fonds

La ĉaudefona Popola Universitato organizis en la salono de CDELI kvar merkredajn vesperojn dediĉitajn al esperanto. Frekventis tiun kurson 10 partoprenantoj. Ĝin vigle kaj intereso-kapte gvidis Monika Molnar. Je la

konkludo de la lasta studvespero la kursanoj unuanime esprimis la deziron daŭrigi la studon de esperanto. Monika Molnar kaj Claude Gacond responde anoncis, ke dum merkredaj grupaj kunvenoj eblos plue praktiki esperanton.

Jen la datoj de tiu neŭŝatela grup-vespero, kiu principe disvolviĝos en la CDELI-salono la duan kaj kvaran merkredojn de la monato de la 19h30 ĝis la 21h30 aŭ aliloke sekve al propono de invitantoj.

maje 25

junie 8 kaj 22

septembre 14 kaj 28

oktobre 12 kaj 26

novembre 9 kaj 23

decembre 14 (zamenhofa festeto).

Estos petita partoprenokosto de po Fr. 4.- por vespero por la kovrado de la elpezoj. Vigligos tiujn renkontojn Monika Molnar, Claude Gacond kaj eble aliaj gvidantoj. Koran inviton ankaŭ ricevos la nepartoprenintoj al la kurso de la Popola Universitato per franclingva invitilo dissendota al la esperantistoj de la neŭŝatela kantono.

Wil

Esperanto-Klubo Wil

Prezidanto: Stanislaw POCHANKE
Lettenstrasse 70, 9500 Wil. Tel.: 071 911 68 30.

Vicprezidanto: Verena CHAVES-WALDER.

Rosenhügelstrasse 22, 9230 Flawil.

Tel.: 071 393 41 49.

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19 h 00 en la Restoracio Blumeneck, Sântisstrasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

-oOo-

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 Zürich-Seefeld

Tel.: 044 251 50 25 <info@esperanto.ch>

reto: www.esperanto.ch/zuriko

Programo

La 2-an dimanĉon de ĉiu monato en Esperantejo de la 14h00 ĝis la 17h00 libera kafejo kun ebleco babili kaj renkontiĝi kun geamikoj.

Konversacia kurso ĉiam merkrede vespere de la 18h00 ĝis la 19h45 en Esperantejo. (Ĝi ne okazas dum lernejaj ferioj).

Sabaton 16-an de aprilo: En Esperantejo: SES-Tago (vidu la apartan programon bulten-komence).

Informoj pri tiuj-ĉi aranĝoj rete ĉe nelida@esperanto.ch, tel.: 044 251 50 25, fakse: 044 261 04 79 aŭ letere: Esperanto-Societo Zuriko, PF 858, CH-8043 Zuriko.

Dietrich Weidmann, la prezidanto.

Svisa franclingva radio pri lingvoj

De la 19-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 2004, la unua programo de la franclingva svisa radio (Radio Suisse Romande, La Première) dissendis ĉiutage, escepte de la semajnfinoj, kvaronhoran elsendon dediĉitan al la lingvoj en Svislando, sub la titolo *Do you speak Swiss?* La prezento okazis je tempo favora por tiuj, kiuj laboras aŭ veturas aŭtomobile, malpli favora por la feriantoj, nome de la 07h45 ĝis la 08h00.

Temis fakte pri etaj enketoj pri difinita demando, ekzemple "eblas vivi en Ĝenevo sciante nur la anglan, sen eĉ plej eta komunikproblemo", "komputila parola samtempa interpretado", "la nuna situacio de la alemanaj kaj tiĉina dialektoj", "kiel adaptiĝis al la nova lingvo alemana knabino, kiu transloĝiĝis al franclingva regiono", ktp.

Esperanto estis menciita plurfoje, kvankam ĝenerale nur metafore. Ekzemple, en la unua elsendo, kiu pritraktis la lingvan situacion en la Federacia Palaco en Berno, intervjuata parlamentano diris: "Ni ĉi tie parolas specon de Esperanto", klarigante, kiel, en unu diskuto, ili ofte miksas lingvojn.

Alia elsendo koncernis "*Globish*". Tio estas, laŭ ties iniciatinto, la franca Jean-Paul Nerrière, la internacia formo de la angla lingvo, kiun kapablas uzi multegaj neanglalingvanoj tra la mondo

(vidu: www.jp-globish.com aŭ <http://jeanpaul.nerriere.free.fr>)

kaj per kiu oni komunikas por superi la lingvajn barilojn. Estas speco de fuŝa angla, kies vortprovizo estas reduktita al 1500 vortoj. Jean-Paul Nerrière estas gravulo, li faris brilan karieron en la industrio, kaj eĉ estis,

antaŭ ol emeritiĝi, vicprezidanto de IBM-Usono (antaŭe li estis vicprezidanto de IBM-Eŭropo). Li menciis Esperanton tre favore, tute pozitive, fakte, kiom koncernas ties konsiston kaj uzeblecon, sed diris: "Bedaŭrinde, ĝi ne sukcesis universale akceptigi sin". Ĝian funkcion, li diris, nun plenumas tiu Globish (=tutgloba aŭ tutmonda angla), kiu havas la grandan avantaĝon, ke ĝi ne havas kulturon kaj estas ligita al neniu kulturo. En tiu elsendo oni povis aŭdi specimenon de informbulteno de "The Voice Of America" en tia simpligita angla lingvo, destinita al homoj kun malprofunda, sed sufiĉa, kompreno de la angla, da kiuj ekzistas multege en la mondo.

La ideojn de Nerrière oni retrovis en programo pri la angla en Zuriko, kie aŭdiĝis la frazo: "la esperanto, kiun ĉiuj atendas, ne baziĝos sur la latina, sed estos speco de bastarda angla lingvo".

Alia elsendo temis pri la instruado de lingvoj, kaj nome pri la temo: kial alemanoj pli volonte lernas la francan ol franclingvanoj la germanan? Tiu programo miaopinie pretervidis ion gravan, nome, ke alemano lerninta la francan tuj povas normale interrilati kun la loĝantoj de franclingva Svislando, dum franclingvano, kiu, lerninte la germanan, retroviĝas en Germanio, trafas medion, kiu parolas tute alian lingvon, ne kompreneblan per tio, kion li studis lerneje. Tiu situacio, ambaŭflanke konata, certe influas la motivadon, kiu, kiel montris multaj studoj, estas la ĉefa faktoro en sukcesa lingvolerno.

Kiel vi vidas, estis ege interesa serio da mallongaj enketoj pri plej diversaj aspektoj de la lingva problemoj.

Versajne vi povas akiri la tutan serion sub formo de kompakta disko ĉe Radio Suisse Romande, "La Première", Avenue du Temple 40, 1010 Lausanne, aŭ interrete ĉe www.rsr.ch.

Claude Piron

-oOo-

Mortoj

Laura Ehrismann-Regazzoni

Forpasis la 28-an de aprilo sinjorino Laura Ehrismann-Regazzoni (1931-2005), iama esperantistino en Lugano.

Gertrud Kuchler

Mortis Gertrud Kuchler (13.11.1931-4.12.2004), la eksedzino de Bruno Graf kaj patrino de iliaj du filoj Markus, kiu iĝis muzikisto, kaj Urs, kiu iĝis arkitekto. Trudi siatempe aktivis kun Bruno en semajnfinoj kaj en la adelbodena skirestado de la Esperanto-Junularo de Svislando. Profesie ŝi akiris komercan diplomon kaj dumvive ŝi interesiĝis pri literaturo, arto, muziko kaj multe migradis en la naturo. Malgraŭ eksedziĝo antaŭ 16 jaroj, kiam ŝi grave malsaniĝis, ŝia eksedzo Bruno denove zorgeme okupiĝis pri ŝi kaj vartadis ŝin.

-oOo-

El la historio de la esperanto-movado

En « SES informas » 1/2004, paĝoj 23-30, aperis rememoroj de svisaj aktivuloj pri Ivo Lapenna. Ni ricevis reagon al tio de Eskil Svane. Prof. D-ro Ivo Lapenna mortis antaŭ 17 jaroj kaj lia nomo apartenas nun al la historio de la esperanto-movado, en kiu li ludis gravan rolon kiel atestas pluraj eseoj kaj studoj. Ĉi tiuj montras ke homoj persone lin konintaj diversmaniere lin aprezas. La sekva kontribuo aldonas pluan interesan vidpunkton.

La Lapenna-enketo

Antaŭ unu jaro, en « Svisa Esperanto-Societo informas », aperis enketo pri profesoro Ivo Lapenna. Mi iom miris ĉar mi ne komprenis la neceson enketi pri homo kiu mortis antaŭ pli ol 17 jaroj, nek la neceson misfamigi mortinton, precipe kiam eĉ la prezidanto mem de UEA, nome de la Asocio, dum la UK en Tampere en 1995, bedaŭris la personajn atakojn, ofendojn, insultojn kaj kalumniojn kontraŭ Lapenna.

Mi ŝatus komenti nur la kontribuojn de Claude Piron kun kiu mi estas en amikaj rilatoj jam 46 jarojn. Claude skribas ke Lapenna sen-skrupule atribuis al si la laboron kiun aliaj faris por li kaj kiel ekzemplon Claude mencias i. a. la Ĉarton de Unuiĝintaj Nacioj pri kiu Lapenna estus forgesinta lian kontribuon.

Tamen Claude Piron trompiĝas kaj tial lia kritiko pri Lapenna almenaŭ tiurilate estas *senbaza kaj maljusta*.


Sed kiel kaj kial? Simple tial ĉar ekzistas *du* tradukoj de la Ĉarto, la unua el 1970, kaj la dua el 1979 (*vidu ilustraĵojn*).

La unuan tradukon eldonis UEA en 1970 sub aŭspicio de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj. Tiun tradukon ellaboris Ralph Harry kaj mi mem kaj – kontraŭe al la asertoj de Piron – al tiu traduko Lapenna aktive kontribuis. Mi dahavas kopion de la korespondado inter Lapenna, Harry kaj mi mem, en kiu li donis al ni konsilojn kaj proponojn pri nia teksto. Laŭ mia memoro Claude Piron neniel asociiĝis al tiu unua traduko, kaj tial Lapenna tute prave diris ke « Ni konsideris ĉiujn aŭtentajn tekstojn de la Ĉarto escepte de la ĉina, ĉar la ĉinan ni ne scias ».

Sed ni lasu Ralph Harry mem rakonti: « Au cours de l'hiver 1950-51 j'assistais à l'Assemblée Générale de l'ONU à Paris. (...) C'est à Paris également que j'ai commencé à traduire en espéranto la Charte des Nations Unies. (...) La traduction, revue et corrigée par Ivo Lapenna, a été imprimée en 1971 (do fakte en 1970, mia rimarko) en même temps que le Statut de la Cour internationale traduit par Eskil Svane. » (Laŭ konferenco en esperanto en Nov-Jorko, 1973.)

Intertempe Harry proponis al la estro de la Oficejo pri Publika Informado de UN en Nov-Jorko ke la mond-organizaĵo mem eldonu la *Carton* en esperanto. La estro konsentis kondiĉe ke la traduko estu oficiale aprobita de UEA (same kiel nacilingvaj tradukoj devas esti aprobitaj de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj de la koncerna

ŝtato-membro). Tial ekestis la neceso zorge revizii la ekzistantan tekston por havi kiel eble plej perfektan kaj definitivan tradukon. En tiu tasko Claude Piron plene kaj tre valore partoprenis. Mi ankoraŭ posedas interesan liston de ŝanĝoj proponitaj de li, kelkaj laŭ inspiro de la teksto en la ĉina kiun li ja plene scipovas.



Dimanĉon, la 26an de junio 1977, Claude afable akceptis min en sia tiama hejmo en Coppet kaj la tutan tagon, de frua mateno ĝis malfrua vespero, ni komparis la ekzistantan tradukon kun ĉiuj kvin aŭtentaj tekstoj, do inkluzive la ĉinan dank' al Claude, kaj ni faris taŭgajn plibonigojn. Poste, dimanĉon, la 28an de aŭgusto 1977, dum tuttaga kunsido en lia hejmo en Nov-Jorko, Ralph Harry kaj mi faris la finan kontrolon de la esperanto-teksto laŭ konkordanco el-laborita de Harry.

Post aprobo en la Centra Oficejo de UEA, UN ricevis la duan tradukon en 1979 kaj presis ĝin en 20 000 ekzempleroj en majo 1980 (*simbolo DPI/511-40712*).

Plue Claude Piron skribas ke laŭ lia – koncedite subjektiva – impresio (li mem diras ke li ne estas senpartia) Lapenna ne estis simpatia homo ĉar li havis superecan manieron rigardi ĉiun alian. *Tion mi neniam sentis*. Ekzemple dum la UK en Kopenhago 1956 mi respondecis pri la elmontro de la Universala Ekspozicio : Dum la gazet-

ara konferenco, kiu okazis en la ekspoziciejo, Lapenna montris al mi kaj sciigis, kun aprezaj vortoj, al la ĉeestantaj ĵurnalistoj ke la respondecon pri tiu aranĝo portis lia juna dana kolego.

Alia ekzemplo: En 1961 mi magistrigis pri kompara jurscienco ĉe New York University post la bezonataj studoj kaj verkado de tezo pri « The Conclusion of Contracts ». Mi deziris ke tiu tezo entenu ankaŭ resumon en la lingvo internacia. Kiam mi petis d-ron Lapenna ke li afable kontrolu la enhavon de la resumo, lingve kaj jure, li senhezite konsentis. (La resumo, « La farado de kontraktoj », aperis en « Norda Prismo », n-roj 1, 2 kaj 3 de 1963 kaj en « Scienca Revuo », vol. 14 de 1964.)

Plia ekzemplo: Post deĵoro en UN mi verkis studon pri « UN kiel packonserva instrumento ». Denove mi petis ke Lapenna ekzameni la enhavon kaj ankoraŭfoje li komplezemention faris malgraŭ siaj multaj temporabaj funkcioj kaj taskoj en kaj ekster la Esperanto-movado. (La studo aperis en « Norda Prismo », n-ro 2, 1969.)

Fine, en la enketo oni citas eldiron de W. M. A. de Smet kiu asertas ke Lapenna suferis de *paranojo* kaj persekutiĝo. Tio estas komplete erara diagnozo. Lapenna neniam timis stultajn, personajn atakojn, sed li suspektis ke la politika neŭtraleco de UEA estos minacata de personoj kiuj estis influataj de la komunista ideologio senkonsidere de la fakto ke ĝuste komunistaj ŝtatoj atakis kaj invadis Ĉeĥoslovakion kelkajn malmultajn jarojn antaŭe. En sia libro « The Captive Mind » la ĵus mortinta litova-pola aŭtoro Czeslaw Milosz

(1911-2004, li forlasis Pollandon samtempe kiam Lapenna forlasis Jugoslavion) sin demandis kiel inteligentaj homoj en libera mondo povas esti allogitaj per la sirena kanto de totalisma reĝimo.

Ĉiukaze evidentiĝis ke Lapenna estis rezoluta daŭre defendi la neŭtralecon de UEA, « iom heterogena rondo », laŭ la vortoj de Ulrich Lins, la komitatanoj el orienta Eŭropo kaj aktivuloj laŭmode maldekstremaj elpensis agadplanon por malsukcesigi la reelekton de Lapenna kiel prezidanto de la Asocio. Fronte al tia manovro Lapenna, sincera kaj respondeca homo, retiriĝis kiel kandidato kaj forlasis UEA (sed ne la Esperantomovadon), sed tiun sintenon oni ne povas karakterizi kiel paranojon.

Kaj finfine Lapenna pravis. Post lia demisio en 1974 UEA devojiĝis ĉiam plu de sia ĝistiam neŭtraleco. (Mi mem dufoje en la kolumnoj de « Esperanto » akre protestis kontraŭ tiu deflankiĝo.) Kulmine, en decembro 1987, simbole en la sama monato kiam mortis Lapenna, la tiama UEA fiere anoncis ke ĝi subskribis interkonsenton pri kunlaboro kun la Monda Pac-Konsilio, unu el la instrumentoj de la eksterlanda politiko de Sovetunio (kiel atestas Ulrich Lins en « La danĝera lingvo »). Per tiu interkonsento la gvidantoj de UEA ne nur perfidis la Statuton de nia Asocio, sed ili ankaŭ montris sin nekredeble nai-vaj kaj miopaj, ĉar malpli ol du jarojn poste la komunistaj reĝimoj en orienta Eŭropo disfalis kaj kun ili la tiel nomata Pac-Konsilio.

Eskil Svane, Francio

Olena Poŝivana, esperanto-entuziasmulino

(R. M.) Sen bonaj scioj de la planlingvo esperanto Olena Poŝivana el Dnepropetrovsko en Ukrainio kaj Martin Meyer el Zuriko probable neniam kontaktus unu la alian persone. Ambaŭ estas blindaj, tio kompreneble kreas ligojn. Sed la fakto kiu antaŭ ĉio alproksimigis s-inon Poŝivana kaj Martin Meyer estas ilia komuna amo kaj pasio por esperanto, lingvon kiun kreis fine de la deknaŭa jarcento la pola kuracisto Zamenhof kiel « mondan helplingvon » kun simpla kaj severe logika strukturo. Martin Meyer, profesia agordisto de piano, kaj Olena Poŝivana renkontiĝis unuafoje en 1996 dum esperantokongreso en Prago. Ambaŭ estas anoj de LIBE, Internacia ligo de blindaj esperantistoj. Unu jaron poste s-ino Poŝivana estis por la unua fojo en Zuriko.

Komputila tekniko por blinduloj

Dum la lastaj jaroj ambaŭ pli ofte korespondis, memkompreneble en esperanto. Signife plifaciligis tiun komunikadon komputila tekniko ebliganta al blinduloj sendi normalajn retleterojn. La ricevanto povas siaflanke aŭskulti ĉi tiujn tekstojn helpe de voĉa sintezilo – aŭ legi ĝin per speciala aparato linio post linio en brajlo. Olena Poŝivana ricevis antaŭ nemultaj jaroj tian komputilan ekipaĵon kiel donacon el Italio. Sed ŝi konfesas ke ŝia ukraina servilo ne estas tre fidinda. Kelkfoje pasas pluraj tagoj ĝis ricevo de sendita mesaĝo.

Olena Poŝivana naskiĝis antaŭ kvardek jaroj en Dnepropetrovsko je la malsupra Dnepro en la suda parto de Ukrainio. Tiam Ukrainio estis neŝancebla ero de potenca Sovetio. La longjara ŝtatestro Breŝnev estis por kelkaj jaroj kompartia ĉefo en Dnepropetrovsko, hodiaŭ urbo kun proksimume 1,3 milionoj da enloĝantoj. Kiam ŝi estis naŭjara, Olena Poŝivana translokiĝis kun sia familio al Murmansko en la alta nordo de la sovetia imperio, ĉar la patro tie trovis postenon. Hodiaŭ s-ino Poŝivana instruas en lernejo por vidhandikapitoj rusan lingvon kaj literaturon en Dnepropetrovsko.

Esperanto – vivmaniero

Kiam ŝi estis deksesjara, Olena Poŝivana komencis lerni esperanton. Detalojn pri tiu lingvo ŝi legis unuafoje en brajla revuo. Ŝi diras decidite ke esperanto ne estas nur plua fremdlingvo, sed ke ĝi estas vivmaniero. Kiu lernas kaj praktikas esperanton, tiu estas ĉiam interesa homo. Oni sentas la ĝojon kaj entuziasmon por komunikado en ĉi tiu idiomo, se oni aŭskultas la viglan konversacion inter Olena Poŝivana kaj Martin Meyer – ankaŭ se oni komprenas kiel nescianto de esperanto nur duone kelkajn vortpecojn. La argumenton, ke la angla intertempe iĝis la domina mondlingvo kaj sekve la funkcio de esperanto kiel « monda pontlingvo » iĝis praktike superflua, rifutas la du esperanto-

entuziasmuloj. Ambaŭ klopodas, ĉiu en sia medio, varbi novajn esperanto-«aficionados», tamen koncedas, ke tio iĝis hodiaŭ nefacila misio.

Martin Meyer invitis sian esperanto-koleginon al Zuriko. La svisa ambasado en Kievo konsiderinde plisimpligis la kutime relative komplikajn procedojn por ricevi vizon. Inter aliaj aktivoj, ambaŭ blindaj esperanto-entuziasmuloj vizitis la svisan muzeon

por blinduloj kaj vidhandikapitoj en Zuriko.

Nun Martin Meyer eksciis, ke lia amikino bonorde revenis hejmen, eĉ se ŝi maltrafis la rapidan trajnon al Dnepropetrovsko en Kievo. La kvincentkilometra veturado per malrapida vagonaro daŭris dekdu horojn...

(NZZ, 28-7-2004, trad. R. S.)

Leĝo pri lingvoj

Adiaŭ kaj for !

Christian Schmid ¹

Dek kvin jarojn ĝi aĝas, la raporto «Stato kaj estonto de kvarlingva Svisio» el la Federacia departemento pri internaj aferoj. Ĝi montras, ke nia lando estas kvarlingva, ĉar ni ĝin volas tiel. Sed ĝi ankaŭ montras ke ni devas ion fari, se ni volas ke ĝi restu kvarlingva. En moderna Svisio la du plej malfortaj membroj, la retoromanĉa kaj la itala, bezonas helpon se oni deziras ke ili estu pli ol ia speco da spico por la supra poteto populara. Leĝo pri lingvoj estus plej bone, diras la raporto. Tial oni duonkudris leĝon pri lingvoj, metis ĝin sub la nazon de ĉiuj interesuloj, por ke ili povu aldoni sian moŝtan opinion. Ĉiuj kantonoj kaj partioj bonvolis kontribui, escepte de tiu partio, kiu ĉiam kondukas populare. Vi kaj mi pagis por tiu laboro daŭranta dum jaroj impoŝtojn, milionojn da frankoj. Nun, nelonge antaŭ la ekzameno fare de la Federacia kon-

silantaro, tiu ĉi ĵetis ĝin al la rubejon. Ni ne havas monon por tiaspecaĵo. Adiaŭ kaj for !

Kion ĝi volis ?

Kion ĝi volis, ĉi tiu leĝo ? Ĝi volis mone subteni plurlingvajn kantonojn, kiel Berno, Valezo, Grizono aŭ Friburgo, ekzemple cele al interŝanĝo de lernantoj, geinstruistoj, al produktado de instruiloj, al lingvokursoj por migrantoj. Ĝi volis ke la retoromanĉoj povu rilati kun la federacia administracio en la retoromanĉa kaj ke ili ricevu respondon en la retoromanĉa. Kaj eble la plej grava : ĝi volis krei sciencan oficejon, centron pri kompetenteco, kiel tio nomiĝas hodiaŭ, en kiu la federacio kaj la kantonoj kune povus solvi demandojn kaj problemojn de la plurlingva kunvivado. Ekde 2008 tio kostus al la federacio deksep milionojn jare, bagatela sumo, se oni komparas kun aliaj elspezoj. Ke la Federacia konsilantaro decidis kontraŭ la leĝo pri lingvoj estas

malfacile digestebla antaŭ ĉio por la grizonanoj kaj tiĉinanoj. Ili, la malplimultoj en nia lando, sentas sin trompitaj. Ili demandas sin, ĉu la kvarlingveco minacata aŭ la delikata lingva paco entute ion signifas aŭ ĉu ili estas nur povra figofolio por io ĉiam pli klare sin montranta: por romandoj kaj alemanoj la romanĉoj kaj tiĉinanoj taŭgas nur por zorgi pri la feria domo, estantaj speco da ĉarmetaj dommastrinaj helpantoj, kun kiuj oni volonte babilas sur la benketo post laborfino, sed kiuj estas neglektendaj kiam temas pri komerco.

La pli larĝa kadro

La novaĵo de la Federacia konsilantaro havas kompreneble pli larĝan kadron kaj ĉi tiu estas la neoliberala kalkulado pri kostoj kaj profitoj. Evidente oni povas diri ke Svisio estas entrepreno, kiu devas havi rentabilitaton. Gesvisoj estas dungitoj de ĉi tiu entrepreno kaj tiu kiu alportas plej multe da mono, tiu ordonas. Laŭ ĉi tiu vidpunkto la grava parto de Svisio reduktiĝas je strio mezlanda de Zuriko al Ĝenevo, la resto sude kaj norde estas rando. Kiu loĝas tie, tiu havas por tiel diri la ciferon du sur la dorso kaj ne plu rajtas ricevi la samajn servojn. En Alpoj, ĝiaj antaŭaj regionoj kaj en Ajoie oni vidis lastjare, kio signifas esti sviso kun la cifero du sur la dorso. Ĉesu kun ĉi tiu leĝo pri lingvoj, komandaĉis al mi iu, kun ĝi vi ne satmanĝos. Konsentite, mi respondis, sed per la manĝo ekskluzive vi ne vivas. Gesvisoj ni ne estas ĉar ni laboregas en la sama entrepreno. Gesvisoj ni estas nur, se nin kunigas io plia ol la fakto, ke

almenaŭ provizore la plimulto el ni bone vivas. Necesas io en niaj kapoj, deziro, celo, scivolo, kio koncernas ĉiujn kaj kio donas al ni la senton, ke Barla, Antonio, Josiane kaj Kōbu apartenas al la sama familio. En familio oni interesiĝas unu pri la alia, donas, prenas kaj ne daŭre demandas: Kiom ĝi kostas kaj kion vi donas al mi interŝanĝe? Ĉar la svisa familio estas granda, necesas kontraktoj inter partneroj, por ke la fortaj ne tro superpezu kaj ne premu la malpli fortajn kontraŭ la muron. Tia kontrakto estintus la leĝo pri lingvoj. La Federacia konsilantaro ĵetis ĝin al la rubejo.

(El gazeto « Der Bund », Berno, 5an de junio 2004, kadre de la bern-diĉa kolumno de la semajnfina eldono tradukis Richard Schneller.)

¹ Christian Schmid naskiĝis en la jaro 1947a en Rocourt ĴU. Li profesiĝis kiel ĥemia laboratoristo, poste studis en la universitato de Bazelo lingvojn germanan kaj anglan. De la 1988a jaro li kunlaboras kiel redaktanto ĉe la svisa radio DRS 1 kaj oni lin regule povas aŭskulti dum la elsendoj « Siesta », « Schnabelweid » kaj « Mailbox ». Kiel sciencisto li okupiĝis pri dialekta svislingva literaturo kaj dialektologio, pri etnologio kaj pri la temaro paroleco/skribeco (Mündlichkeit/Schriftlichkeit). Li verkis kelkajn kaj eldonis aliajn librojn. Laste aperis germanlingve « Nebenaussen » (ISBN 3-05-00405-3).

Ueli Haenni

—oO—

Edmond Privat kaj la tragikaj eventoj en Ĝenevo en 1932

Oni petis min kompiltraduki el franclingva artikolo de Edmond Privat pri la tragikaj novembraj eventoj en Ĝenevo en la jaro 1932. Sekve de tio mi konstatis ke nun disponeblas ĉiuj artikoloj (1920-1956) verkitaj de Privat en la svisa socialista gazeto franclingva « La Sentinelle » sur kompaktaj diskoj. Eldonis ilin Libro-mondo kaj CDELI. Edmond Privat komentis ĝenerale en ĉi tiu gazeto mond-politikajn eventojn, sed kompreneble li reagis al la tragikaj eventoj en sia naskiĝurbo.

Mallonge pri la tiama situacio: En tiu tempo de ekonomia krizo ankaŭ en Svisio kreskis senlaboreco kaj strikoj kaj la faŝismo disvastiĝis. En Ĝenevo socialistoj, komunistoj kaj

anarkiistoj manifestaciis kontraŭ la influo de la Nacia Unio okaze de ties kunveno. Ĉar la loka polico ne estis sufiĉe forta oni postulis trupojn de la armeo, kies laŭkonstitucia tasko estis defendo en kazo de atako deekstera sed ankaŭ deinterna. Tamen la milicsoldatoj tute ne havis spertojn pri kontrolo de manifestaciantoj kaj nenian trejnadon pri tio. Dum la manifestacio kelkaj soldatoj estis atakitaj de manifestaciantoj kiuj forprenis al ili pafilojn kaj detruis ilin. La reago de la armeo estis tute neproporcia : sen averto oni pafis sur manifestaciantojn kaj spektantojn : rezultis 12 mortintoj kaj 65 vunditoj.

Richard Schneller

SUFIĈE DA MASAKROJ !

« (...) La interna milito ne estas pli bela ol la internacia kaj neniam perforto forigis perforton, kie provokantoj profitas de favoraj cirkonstancoj.

« Kaptilo prepariĝas por la laborista klaso svisa. Ne necesas ke ĝi eniru la kaptilon. Maltrankviligitaj de la progreso de socialismo, kiu sin armis per

voĉdonilo kaj amasedukado, la perfortemaj elementoj burĝaj volus haltigi la naturan progreson de la demokratio.

« Ili volus plirapidigi la lukton sur la perforta tereno por dispremi la socialismon antaŭ ol ĝi atingos sian plenaĝon. Kial la laboristoj falu en la kaptilon akceptante ĉi tiun terenen? (...)

« Se oni volas lasi al la kontraŭulo la tutan honton, kiu estas ligita al la nehumana uzo de perforto, tiam ekzistas nur unusola rimedo : oni absolute detenu sin uzi perforton.

« Fakte la socialismo en Svisio praktikis neperforton de jaroj. La pacaj strikoj ne estas io alia kaj la laboristaj amasoj ĝenerale estas nearmitaj. (...) Praktike ili estas senarmaj, parole ili diskutas pri sia sinteno por la okazo ke oni iam devus kontraŭbatali la faŝismon kaj pri tio la opinioj ne estas unuanimaj.

« Do unusola gesto, unusola frazo, unusola konduto, unusola polemiko pri la revolucio minacanta en eksterlando donas al la kontraŭulo la okazon famigi la tutan movadon kiel perforteman kaj la plej malbonajn perfortojn de militistoj kiel leĝan sindefendon.

« Tiuj kiuj antaŭvidis armitan ribelon en kazo de mondmilito certe ne intencis ekkapti la povon la 9an de novembro en Ĝenevo. Ili estus marŝintaj direkte al la urbodomo kaj ne al la ekspozicia palaco. Ili estus kolektintaj fusilojn anstataŭ disrompi ilin. »

Fine de la artikolo Edmond Privat proponas ke la Socialista partio fiksi sian metodon rilate disciplinon dum manifestacioj kaj prenas kiel modelon la kondutregulojn de la Hinda kongreso.

« (...) En la aktuala situacio la programo de la Socialista partio baziĝas sur pacaj aktivadoj, amas-edukado kaj uzo de voĉdonrajto. Nek la provokoj nek la mitraloj determinas la agadterenon de la laborista movado. Ĉi-lasto scias kie ĝi staras. Ĝi povas rezisti al la tento eniri la kaptilon, kien oni volas logi ĝin por dispremo de unu generacio.

« Ĉi putra tereno estas la perforto. Oni devas klare kaj publike rifuzi ĝin sen allasi minacojn. »

(« La Sentinelle », 1932-11-16)

En la sama gazeto sekvis du artikoloj de Edmond Privat pri tiuj eventoj :

– La angla gazetaro kaj la ĝeneva tragedio (1932-11-17)

– La socialistoj kontraŭ la interna milito (1932-12-10)

Koncizan biografion pri Edmond Privat oni povas trovi rete en [Wikipedia : http://eo.wikipedia.org/wiki/Edmond_Privat](http://eo.wikipedia.org/wiki/Edmond_Privat).

En « Aventuroj de pioniro » (Stafeto, La Laguna 1963) oni povas trovi pliajn detalojn.

-oOo-

teknoŝofio

pri interreto, tekniko, socio kaj la sekvoj. kunmetita por vi de rolfo@esperan.to (komentoj bonvenaj – jes, skribu!)

1. «Pura» esperanto-domajno* malfermiĝis en junio 2004

Malfermiĝis nova retejo dediĉita al la lingvo internacia. La adreso estas simple esperan.to, la retejo estas atingebla kun aŭ sen www (kiel ankaŭ ĉirkaŭ la duono el ĉiuj retpaĝaroj). La celo estas kolekti ligojn al bonaj esperanto-retpaĝoj tutmondaj, por substreki kaj fortike prezenti la altkvalitan aperon de la lingvo esperanto en la virtuala spaco.

La retadresa nomo «esperan.to» estas kvazaŭ vortludo kun la landa kodo .to de la sudpacifika insulo Tongo. Do neniu ĝena malesperantlingva sufikso kiel .com (komerco), net (reto), biz (negozo): simple entajpu: esperan.to.

2. Nova definitiva reteja adreso de SES

«esperan.to» gastigas la retejon de la Svisa Esperanto-Societo ekde somero 2004. La nova adreso al la paĝaro de SES estas nun <http://esperan.to/ses>

La «responda kupono», kiu funkcias ekde pli ol jaro sur la SES-retejo, estas ofte uzata de personoj interesigantaj pri la lingvo aŭ kiuj volas membriĝi ĉe SES. Ĉiusemajne troviĝas tiaj retaj informetoj atingantaj rekte la prezidanton de SES. El tio videblas: la intereso pri la internacia lingvo daŭre ekzistas – kaj perrete plej facilas kontakti la ĝustajn personojn.


3. Kunkreu la plej grandan enciklopedion


Ĉu vi ne foje emis ŝanĝi retpaĝon, ĉar ili estis malkompletaj aŭ erarplenaj? Kutime la retpaĝoj estas statikaj, oni devas preni ilin tiaj, kiaj ili estas – sen la ebleco de kompletigo/aldono. Iama praideo de la tuttera tekŝaĵo (TTT) estis tamen, ke ĉiu uzanto povu kunkrei la reton aktive, aldonante sian scion al iaj paĝoj, ne nur al siaj propraj.

Vikipedio ebligas tion. “La libera enciklopedio” aperis, ekde kvar jaroj, jam en multaj lingvoj: inter la unuaj estis esperanto. Vikipedio (mallonge: Vikio) estas reta leksikono, kiu estas daŭre plibonigata, plivastigata, pluredaktata – redaktata libervole de homoj kiel vi kaj mi. Preskaŭ 19 000 artikoloj jam troviĝas en la esperanta versio, kiu cetere, se via komputilo kapablas, montras la supersignitajn literojn tute nature, sen x-oj.

Eble vi legis antaŭ iom da tempo supajan negativan artikolon en iu trisemajna esperanto-gazeto, kiu kritikis malaltan lingvonivelon en Vikipedio. Tiaj argumentoj estas ridindaj rilate al Vikio, ĉar ja ĉiu rajtas ŝanĝi (komprenu: plibonigi) la paĝojn kaj suprenigi la laŭdiran «malaltan lingvokvaliton».

Vikipedio estos, post kelkaj jaroj, sendube la plej ampleksa enciklopedio en la mondo – en ĉiu lingvo. Mi eĉ aŭdacas diri,





ke Vikio estos kvazaŭ PIV3, almenaŭ por la leksikona parto...

Do ne hezitu kaj ekredaktu Vikipedion pri via faka aŭ ŝata temo! Trovu ĉiun informojn (ekz. ankaŭ "Kiel redakti paĝon?") je www.wikipedia.org

4. Postkurante la rapidecon

Kiam mi unufoje paŝumis en la interreto, antaŭ 11 jaroj, mi havis modemon, kiu permesis transsendrapidecon de 2400 bitoj sekunde. Tio estas ĉ. unu plentajpita A4-paĝo en 6 sekundoj.

Nuntempe mi estas priservata de reta konekto, kiu liveras la mi 600 kilobitojn sekunde, kio egalas al 250obla kvanto kompare al tiam: 42 A4aj tekstopaĝoj en unu sekundo.

Kaj honeste dirite, tiu rapideco de datumoj ankoraŭ ne vere sufiĉas. Sufiĉas ja por legi nur tekstojn. Sed nuntempe la reto estas uzata por transsendi bildojn, sondokumentojn, radioprogramojn, filmetojn aŭ eĉ televidprogramon. Por aŭskulti retan radion jam sufiĉas la kapacito – tamen ne por bonkvalite rigardi perretan televidon. Alta transsendkapacito ankaŭ necesas por

iam sekvonta vidtelefonado.

Ĉar la tekniko daŭre evoluas, ni verŝajne transsendos post dek jaroj 200oble tiom rapide, tio estas proksimume 120 megabitoj (Mbit) ĉiun sekundon, t.e. pli ol 8000 A4-paĝoj. Kaj ni povos vere havi ĉion per kaj tra la reto: dek-egoj da televidprogramoj, vida (surekrana) interkomunikado kun amikoj tutmonde, kaj kaj kaj.

Tio estas la ĉiam evoluanta teknika flanko, kiu neniam haltos. Aliflanke demandindas, ĉu obligado de komunikrapideco signifas obligado de komunikkvalito. Honeste: apenaŭ (komprenu: tute ne). Logike pensite, rapideco signifas tempo-gajno – aliflanke ni konstatas, ke nuntempe mankas al ni pli da tempo ol iam antaŭe. Pli da rapideco signifas simple pli da eblecoj por novaj servoj (kiuj denove konsumas nian tempon). Do rapideco ne vere estas la grava punkto. Cetero: rapideco kaŭzas, ke ĉio pli kal pli rapide malnoviĝas.

Kaj krome: kvankam reta komunikado kaj poŝtelefonado estas konvenaj aĵoj – ili neniam anstataŭos (eĉ ne per la superoftiĝanta uzado) gajan rondon intergeamikoj kuntrinkantaj aŭ kunmanĝantaj. Neforgesenda estas la fakto, ke «komuniki»/«komune»/«kune» estas etimologiaj gefratoj – celite estas la rekta kuneco kun okula kontakto, permesanta senperajn emociojn. ♦

* Se iuj teknikaj fakvortoj malklaras, vi povas trovi ilin en la bone verkita «Komputada leksikono» de Sergio Pokrovskij – ligo [trovebla ĉe esperanto.to](http://trovebla.ĉe.esperanto.to).